



Protokolo de la Estrar-kunsido de ELI, la 9-an de Januaro 2023

Ĉeestantoj: Jehoŝua Tilleman, Dror Gaon, Avigail Meŝulam, Inbar Mor, Amri Wandel.
Zome: Mikaelo Lineckij, Ŝlomo Ŝaĥar, Gabi Zeevi.

La Estraro esprimas siajn kondolencojn pri la forpaso de nia amikino, Joela Egozi.

Protokolo de la pasinta kunsido estis sendita al la estraranoj kaj baldaŭ enretigota.

1. Raportoj

- a) Ni dankas al la patro de Inbar pri la bonvolo helpi nin.
- b) **Amri** komencis novan kurson “Nicocot” – 3 lecionoj por 15 gejunuloj de la 10-a klaso, en la mezlernejo *Ironi Dalet* en Modiin.
- c) **Amri** subskribis nome de ELI la kontrakton kun Bar Vardi pri la luigo de la oficejo.
- ĉ) Aida, esperantistino el Kovno, Litovio, vizitos nin ĝis la 15 de Februaro; ŝi promesis prezenti per zomo.
- d) **Ŝlomo** ricevos liston de **Jehoŝua** pri tiuj el niaj membroj, kiuj ne membras en UEA.
- e) Laŭ la informo de Michal Amir, Joela Egozi forpasis post kor-operacio. Jehoŝua skribos nekrologon por *IE* pri d-ro Aharon Davidzon kaj poste ankaŭ pri Jinon Meiri, Rami Ŝlain kaj Joela Egozi.

2. La tombo de Isaj Dratwer (Dror)

Dror malkovris per aplikaĵo pri tombejoj, ke la tombo de Isaj Dratwer en la jam delonge fermita tombejo de Bat-Jam – Ĥolon, estas senŝtona, kovrita nur de sablo. Ni devus meti tomboŝtonon, ĉar Dratwer estis israela (antaŭe pola) aktivulo kaj heredigis sian loĝejon al nia Asocio. **Jehoŝua**: ELI pripagis la tomboŝtonon, kiun mi prizorgis post la forpaso de Andreo Ŝalomon en 2001. **Amri** konas tombofariston kaj petos oferton (povas kosti inter 2 kaj 3 mil sikloj).
Voĉdono: unuanime por!

3. Buĝet-propono por 2023 (Ŝlomo)

Voĉdono: La Estraro akceptas la raporton de Ŝlomo pri la buĝeto.

4. La poŝtkesto de ELI (Jehoŝua)

Jehoŝua: Amos Ŝapira redonis la ŝlosilon, ĉar li ne plu loĝas en TA, kaj malsanadas. **Avigail**, kiu luadas poŝtkeston en la sama filio, akceptas la taskon anstataŭ li. *La Estraro dankas al Amos pro la ĝisnunaj servoj kaj deziras al li longan k sanan vivon.*

5. Nia oficejo (Amri)

Amri: ĉar ni fuŝis la luigon jam 3-foje, mi subskribis 1-jaran kontrakton kun Bar Vardi ekde la jarkomenco. Ni “gajnos” 1,255 siklojn, ĉar ni NE pagos tiun sumon al la tur-administrantoj. Vardi rajtas plu-luigi post Erez, la nuna luanto. Ni plurajtas havi seĝojn dum la kunvenoj.

**6. Magazeno** (Ŝlomo)

Ŝlomo telefonis al ĉ. 20 perantoj. Ne venis reagoj. Ĉu akiri kontenerojn, kaj kie ilin teni? Ŝlomo informiĝos en sia kibuco.

7. La ĉi-jara IK (Amri)

Amri: jam aliĝis kelkaj eksterlandanoj, eĉ kun prezentaĵoj kaj la programo estas preskaŭ preta. Ĝis la 10-a de Marto oni povas pripensi – poste ni devos pagi.

8. Israela Esperantisto 174 (Mikaelo, Amri)

Mikaelo volas ricevi la lastan materialon; Amri sendos post 2 tagoj.

Rimarko: pro eksterlanda foresto **Amri** ne ĉeestos la venontan kunsidon en Februaro.

La venonta kunsido: lunde, la 6-an de Februaro 2023, je 20:00

Protokolis: Gabi Zeevi